

INFORMA BULTENO
de la Esperantista klubo en Brno.

Nro 13.

Novembro 1932.

Por la membroj la Bulteno estas sennaga, sed ĉiu estas petata doni libervole ian sumon, por kovri niajn elspezojn. Kiu deziras poste ricevi la Bultenon, devas pagi almenaŭ la poŝtelspezojn.

Kion instruas al ni la krizo ?

Estis tempoj, kiam la homoj mortis pro malsato, ĉar la grenrikolto ne sufiĉis. Dum la nuna tempo oni suferas pro troo da greno kaj da ĉiuspecaj aliaj varoj, kiuj ne vendiĝas. Pli perfektaj labormetodoj, ĉiuspecaj inventoj kaj maŝinoj tiom faciligis kaj simpligis la produktadon, ke ni povus esti ĉiuj riĉuloj, se ni posedus pli perfektan organizon. Anstataŭ tio, ni ĉiuj malriĉiĝas. Niaj fabrikoj povus produkti riĉaĵojn. Sed, kiu ilin pagu? Finfine pagi oni povas ankaŭ nur per aliaj produktaĵoj. Se vi estas laboristo, vi pagas per via laboro, produktanta varojn. Se vi estas kamparano, vi pagas per la greno rikoltita. Do, la simpla logiko diras, ke sufiĉas produkti kaj interŝanĝi la varojn por venki la krizon. Tamen tio ne okazas. Mankas organizo, tio estas: interkompreno. Ekz. se ni dirus al la farmistoj en Argentino: "Donu al ni vian superfluan grenon, kiun vi forbruligas, donu ĝin al niaj senlaboruloj, kiuj por tiu greno al vi faros vestojn, aŭ ŝuojn, aŭ aliajn varojn, kiujn vi bezonas" oni povus kontentigi la argentinajn farmistojn kaj la ĉeĥoslovakajn senlaborulojn. Sed mankas interkompreno, unu baras sin kontraŭ la alia, oni volas nek vidí, nek aŭdi. Se ni volas resaniĝi, ni devas komenci per interkompreno, interkonsento. Nun necesas pli ol iam ajn Esperanto, tiu ŝlosilo de la koroj. Ni povas esti optimismaj: komencante la likvidadon de la krizo, oni enkondukos Esperanton.

E. S.

I n v i t o j .

Marde 29./XI.

Klubejo, hotelo Passage.

Pri

Esperanta literaturo k.verkistoj

parolos s-ro Bleier el Budapest, eldonisto de la Literatura Mondo.

Komenco je la 20-a.

Eniro senpaga.

Krome estos bona okazo aĉeti valorajn esp. librojn,
kiujn s-ro Bleier kunportos.

La 16 -an de Decembro /vendrede/
okazos

granda amuza vespero

kun bona kaj varia programo en la spegulsalono de hotela Passage.

Venu por ridi, gaji, entuziasmiĝi.

Per via vizito montru ekziston de konsiderinda brna movado!

Komenco je la 20-a. - Enirpago libervola. - Gastoj bonvenataj.

El la klubo vivo.

Atentu bone: Kunvenoj de brnaj esperantistoj okazas regule ĉiumarde je la 20-a en bela klubejo /box 1/ de hotelo Passage. Memoru tion kaj venu!

La I. B. Pri vi ĉiuj ni pensas. Neniun el vi ni volas perdi en la batalo por la internacia lingvo. Vi estu

ligata al la movado pere de ni: Vi estu informata pri la laboro de ni farata! Tial ni eldonas la Bultenon.

Vizitis nin: s-ro Elis Nyrrel kun sia edzino el Laxa, Svedio. Vizitadas niajn kunvenojn bulgaraj altlernejaj studentoj, plej fidele s-ano D. Medkof.

Kursoj. Al la kurso sur Veverí aliĝis 11 personoj, krom ili vizitas la kurson kelkaj klubanoj. Instruas Vondroušek.

Brno - Maloměřice : esp. kurso ĉe Osvětový sbor ; instruas s-ro instr. Jeřábek. Brno - Tuřany : kurson gvidas s-ro instr. Hoffner .

Propagando. Ni havas provizon da tre belaj, koloraj afiŝoj sur la kartono, destinitaj por daŭra reklamo al Esperanto. Eldonis : Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista , Praha XIX , 447 . Se vi havas eblecon videble elpendigi tiun afiŝon, postulu ĝin de ni: Taŭgas bone por atendejoj, montrofenestroj ktp.

Insigonojn portu : Aĉeteblaj en nia klubo po Kč 3.-, 4.-, 5.- .

Grava . Venu aŭskulti la paroladon de s-ro Bleier!

Partoprenu nian solenon en Decembro! Vidu 2-an paĝon!

Korespondemaj samideanoj. Ni vendas poŝtkartojn kun plano de la ĉeĥoslovaka respubliko; 10 pecoj kostas Kč 2.- Eldonis Ĉ.A.E.

Radioparoladoj el Brno. Kurso de Esperanto ĉiun mardon kaj ĵaŭdon. Aŭskultu kaj skribu al Radiojournal, Brno .

Kolektu! Ni petas, gazet-artikolojn pri E. eltranĉu k. transdonu al nia klubo.

El la movado.

La 24.a Universala kongreso de Esperanto en Paris havis pli ol 1600 partoprenintojn kaj entute brile sukcesis. Okazis 55 fakkunvenoj; prelegoj en la Somera Universitato havis neordinare grandan partoprenon. Venonta, 25-a, do jubilea kongreso, okazos en Köln a.Rh.

La V-a Internacia kongreso por seksa reformo, Brno, 20.-26. Sept., uzis Esperanton, kiel kongreslingvon. Dro Leunbach, unu el la tri prezidantoj de la Ligo k. de la kongreso havis enkondukan parolon en Esp. En salono de DOPZ en publika parolado li finis sian parolon en E. Ankaŭ en radio-parolado li parolis Esp. La kongreson salutis nome de brna esperantistaro s-ro Baďura /en Esp./. Kiel nia prez. s-ro Baďura raportis ankaŭ la famekonata scienculo Magnus Hirschfeld perfekte parolas Esperanton. Prospektoj k. programoj estis presitaj ankaŭ Esperante.

Dum la ĝenerala kunveno de Mezeŭropa Instituto, Brno, 27./10., parolis s-ro prof. H. Traub pri Esp., kiun oni enkonduku en la lernejojn k. pli multe instruu. Prezidanto de la Mezeŭropa Instituto estas universitata profesoro Dro. Weyer, vicprezidanto s-ro urbestro Tomeš.

Esperanto en radio. Dum la jaro 1931 regule disaŭdigis E. 126 sendstacioj el 26 landoj .

V.

La tragedio en cikonia nesto.

En Konstantinopola gazeto estis antaŭ nelonge sciigo pri tre interesa okazintaĵo. En iu vilaĝo apud Brusa okazis tragedio, kiu elserĉis por si scenejon en cikonia nesto, alte sur kamentubo.

Ĉiam printempe revenadis en tiun neston cikonia paro, riparis en la nesto, kion la vintro detruis, preparis sin por familia okazintaĵo. Tiun ĉi jaron tio estis sama, kiel en ĉiuj aliaj jaroj. Longpiedaj geedzoj ekloĝiĝis en la nesto. En la vilaĝo ne restis ilia reveno sekreta kaj estis granda ĝojo pro ili. Cikonia sinjorino metis ovojn kaj jam ilin ne forlasis. Dume la edzo forflugadis prizorgi ion bonan por sia edzino. Unufoje revenis la longpieda edzo kun granda rano en la beko. Cikonia sinjorino akceptis la frandaĵon, sed tuj sekve inter la geedzoj ekestis malkompreniĝo, kiu ne sole ke ne ordiĝis, sed fine transiris en kruelan geedzan disputon. Tio estis grandega disputo, kiel ĉe homoj. Kiam la ŝanĝo de opinioj estis plej brua, subite la cikonio forflugis. Ne daŭris longe kaj li revenis al la nesto kun aro da cikonioj. Post nelonga pepado, kiu multe similis al ia scienca konferenco homa, komencis ĉiuj cikonioj batmortigi la malfeliĉan cikoniinon kaj poste elĵetis ŝin el la nesto. Kiam estis tiu juĝo preta, ekkaptis la cikonia vidvo ion singardeme per la beko, elportis el la nesto k. metis teren.

Tradukis M. Adamcová.

Finota.

La Bulteno aperas kelkfoje dum jaro, laŭ bezone. -

Redaktoro: Ernst Sonnenfeld. - Eldonanto:

Esperantista klubo, Brno , Veveří 28.